N-ro 1 | Marto 2014

# SLEA INFORMILO

Sveda Laborista Esperanto-Asocio | Svenska arbetaresperantoförbundet




- Poemoj
- Norda Prismo
- Sindikataj novaĵoj
- Novaĵoj de libroservo
- La lukto por Rote Flora
- Eŭropa kontraŭfaŝisma manifesto

# SLEA-INFORMILO

Organo de
Sveda Laborista Esperanto-Asocio

**La redakcio de SLEA-Informilo:**
Daniel Sandgren
Marcus Hansson

**Retpoŝto:** slea.smolando@hotmail.com
**Retejo:** www.slea.se

**La estraro de SLEA:**

**Prezidanto:** Daniel Sandgren
**Sekretario:** Guy Coste
**Kasisto:** Marcus Hansson
**Ceteraj estraranoj:**
Soile Lingman
Lars Gogman

**SAT-perantino:**
Inga Johansson
Retpoŝto: ishim@hotmail.com

**Plusgiro 5 31 60 - 8.**
(Sv.Arbetar.Esperanto-förb.)

**Atentu!** Pri la enhavo de SLEA-Informilo responsas la kontribuintoj mem.

**LASTA DATO POR LA MANUSKRIPTOJ AL LA SEKVONTA ELDONO DE SLEA-INFORMILO 2014-05-05.**

**Aper-plano 2014**
Marto, Junio, Septembro, Decembro.

# Enhavo


- **La lukto por Rote Flora en Hamburgo, p.3**
- **Sindikataj novaĵoj,p. 4, 5 kaj 6**
- **Jirina Jonasson, ripozu en paco! p. 6**
- **Norda Prismo, p. 7**
- **Eŭropa kontraŭfaŝisma manifesto, p. 8, 9 kaj 10**
- **Poemoj, p. 11, 12 kaj 13**
- **Novaĵoj de libroservo, p. 14**
- **Pri Esperanto DVD-filmo p. 15**
- **Libroservo, p. 16**


## JARKOTIZO POR 2014

Glöm inte att betala din
medlemsavgift för 2014!

Ne forgesu pagi vian kotizon por 2014!

**SLEA JARKOTIZO/MEDLEMSAVGIFT 2014**

- Unuopa membro/Enskild medlem 50:-
- Familia membro/Familjemedlem 30:-

- Stokholmanoj, unuopa membro/Stockholmare, enskild medlem 65:-
- Familia membro/Familjemedlem 30:-

**Plusgiro 5 31 60 - 8.**
(Sv.Arbetar.Esperanto-förb.)



# La lukto por Rote Flora en Hamburgo

**Ekde la pasinta 21a de decembro, kiam oni malhelpis la manifestacion por la Okupitejo Rote Flora en Hamburgo, la polica perforto okupis la centrajn kvartalojn de la urbo. Per la preteksto de agresoj al la policanoj fare de grupoj de maldekstraj junuloj, la aŭtoritatoj deklaris kaŝitan senrajtan staton, kiu permesas al ili priserĉi kaj aresti iun ajn personon sen kaŭzo.**

Rote Flora ("Ruĝa Flaŭro") estas socia kaj kultura maldekstra ejo en Hamburgo, kiu estas okupita kaj memadministradita de la jaro 1989. La proprietulo de la konstruaĵo metis limtempon al la aktivuloj de Ruĝa Flaŭro, ordonante ilin forlasi ĝin antaŭ la 20a de decembro. Neniu dubis, ke ili ne akceptos ĝin, ĉar "Rote Flora bleibt" (Ruĝa Flaŭro restas!).

La sabaton 21an de decembro oni kunvokis sur la stratoj de la centro de Hamburgo manifestacion kun triobla celo: tute klarigi, ke iu ajn klopodo de eldomigo de la socia ejo okazigos homamasan reziston; denunci la aferon pri nemoveblaĵa spekulado okazanta en la apuda kvartalo de Sant Pauli, kie la loĝantoj de bloko de loĝejoj konata, kiel Esso estas devigotaj forlasi siajn hejmojn antaŭ la risko de disfalo de la konstruaĵoj por esti anstataŭitaj de nova bloko de luksaj apartamentoj; kaj laste la rajto de restado por la rifuĝintoj alvenintaj de Lampedusa.

Per la mobilizado de ĉirkaŭe 3.000 policanoj pretekstante, ke povis esti perfortaj partoprenantoj la aŭtoritatoj malhelpis la manifestacion, kiu jam estis komunikita kaj estis tute leĝa. Malgraŭ la polican premon, 7.300 personoj laŭ la polico kaj pli ol 10.000 laŭ la organizantoj, kunvenis en la centro de Hamburgo. Kiam la komenco de la manifestacio nur estis trairinta malmultajn metrojn estis atakita de la polico, kiu uzis gason pipro, bastonojn kaj akvokanonojn por disigi ĝin. Ĉi tio kaŭzis gravajn tumultojn en la centro de la urbo, la plej gravaj el la lastaj jaroj laŭ la polico kaj centoj da vunditoj, iuj el kiuj bezonis hospitalan prizorgon. Same, 16 personoj estis arestitaj. Endas elstari, ke la polico deklaris la centron de Hamburgo, kiel danĝeran zonon, kio laŭ la germana leĝaro signifas serion da specialaj permesoj, kiuj rajtigas la Policon por priserĉi kaj aresti iun ajn personon sen neniu konkreta suspekto. Same, pluraj centoj da manifestaciantoj pasigis pli ol 4 horojn ene de kettle (polica barilringo), ĉirkaŭitaj de policanoj, sub la libera ĉielo, sen manĝo kaj pluvante.

En la komunikaĵo alvokinta la mobilizon, la aktivuloj de tiu socia ejo diris: "Rote Flaŭro estas nur unu el la multaj lokoj, kiuj nuntempe spegulas la konfliktojn okazantajn en la urbo". Ĉi-sence, antaŭ la deviga eldomigo de Esso, oni depostulas, ke ĉi tiu konstruaĵo estu riparita, tiel evitante la malkonstruon de la bloko de konstruaĵoj kaj novan epizodon de elitigoi en la longa proceso okazanta ĉe la kvartalo de Sant Pauli. Koncerne al la situacio de la ĉirkaŭe 300 rifuĝintoj, kiu atingis Hamburgon komence de ĉi tiu jaro devenintaj de landoj, kiel Sirio, Egiptio aŭ Libio, kaj kiuj luktas por ilia rajto restadi en la urbo, la citita komunikaĵo diris "ĝis nun, la aŭtoritatoj neis al ili la rajton restadi, per la minaco esti deportitaj al Italio, kvankam granda nombro el ili registris sin antaŭ la aŭtoritatoj kaj prezentis sian peton pri azilo".

**Esperantigita de Jesuo González**

El la angla, gentrification, estas proceso de urba aliiĝo per kiu la devenaj malriĉaj loĝantoj de difektita kvartalo estas iom post iom anstataŭitaj de aliaj pli riĉaj.

La teksto el la retpaĝo:
http://www.rojoynegro.info/articulo/cultura-libre/la-lukto-rote-flora-hamburgo

# Sindikataj novaĵoj

www.labourstart.org/eo



**Kamboĝo : la justico rifuzas liberigi 21 aktivulojn, malgraŭ la internaciaj kritikoj**

*La peto pri provizora libereco de 21 kamboĝaj aktivuloj estis rifuzita, malgraŭ alvokoj de defendantoj de homaj rajtoj en ilia favoro.*

Malgraŭ la internaciaj alvokoj, la kamboĝa justico rifuzis ĉi-mardon 11an de februaro liberigon je kaŭcio de 21 aktivuloj arestitaj dum la sanga subpremo de striko de teksaĵlaboristoj pasintan monaton.

Tiu afero maltrankviligis la defendantojn de homaj rajtoj, dum la aŭtoritatoj antaŭnelonge disigis perforte plurajn manifestaciojn kiuj defiis la Ĉefministron Hun Sen, kiu regas de preskaŭ 30 jaroj.

La potenca viro frontas kreskantan ribelon de opozicio kaj de teksaĵlaboristoj, la opozicio postulante novajn balotadojn post tiuj de julio, kiuj laŭ ĝi sin makulis per masivaj fraŭdoj.

Komence de januaro, almenaŭ kvar personoj estis mortigitaj kiam la polico pafis al tiuj strikantaj laboristoj postulantaj pli bonajn salajrojn.

Ekde la posta tago, la aŭtoritatoj malpermesis ĉiajn kolektiĝojn en la ĉefurbo.

**La aktivuloj riskas kvin jarojn da malliberejo**
Dudek tri personoj estis arestitaj dum tiu interveno kontraŭ la teksaĵlaboristoj, inter kiuj du estis kaŭcie liberigitaj antaŭ kelkaj tagoj kaj pluraj aliaj malliberuloj komencis malsatstrikon.

Dum fermita aŭdienco mardon, apelacia kortumo de Pnom-Peno rifuzis la liberigon de la 21 detenitoj, substrekante ke tio « ĝenus publikan ordon » kaj malhelpus la juĝproceduron, indikis al la gazetaro la advokato pri defendo Sam Sokoung, promesante meti la aferon ĉe la Suverena kortumo.

Neniu dato estis fiksita por la proceso. La defendantoj de homaj rajtoj opinias ke ili riskas kvin jarojn da malliberejo, aparte pro perforto.

En malfermita letero al Hun Sen, deko da internaciaj NRO-oj petis lundon pri ilia liberigo. La Internacia Konfederacio de sindikatoj ankaŭ lanĉis kampanjon « Liberigu la 23 », alvokante premon sur la ambasadejoj de Kamboĝo tra la mondo.

**Manifestacio antaŭ la tribunalo**
Ilia plua mallibereco provokis koleron de ĉirkaŭ 200 manifestaciantoj kolektiĝintaj antaŭ la tribunalo, kelkaj kriante « la kortumo estas tre maljusta ». La loka asocio pri defendo de homaj rajtoj Adhoc denuncis la decidon kaj alvokis la aŭtoritatojn fari justicon por la mortigitaj aktivuloj.

« Ĝis nun, neniu respondecis pri la perforto, substrekante la nepunitecan kulturon kiu venenas Kamboĝon », ĝi kritikis.

**Sud-Afriko : la platenministoj plu strikas**

La platenministoj kiuj strikas en Sud-Afriko forpuŝis, ĉi-ĵaŭdon, la oferton pri salajra altiĝo fare de la dungantoj, indikis reprezentanto de la sindikato Acmu, iniciato de la movado. Konsekvence, la striko daŭros. « Tiu oferto estas neakceptebla. Ni estis mandatitaj por daŭrigi la intertraktadojn. Por la momento, la striko daŭras », deklaris Reuben Lesejane, sekretario de Acmu en ŝakto de Lonmin, unu el la tri unuaj platenproduktistoj en la mondo tuŝata de la striko.

La tri kompanioj paralizitaj de la striko, Anglo American Platinum (Amplats), Impala Platinum (Implats) kaj Lonmin, fakte proponis planon pri salajra revalorigo laŭ tri jaroj, kun altiĝoj inter 7,5% kaj 9% la unua jaro. La dungantoj reviziis sian oferton kiu iompostiome kondukis al « salajra pakaĵo » po 12.500 randoj (ĉirkaŭ 810 eŭroj) monate, samtempe indikante ke baza salajro de 12.500 randoj estas « neebla en proksima estonteco ».
« Estas malfacile, ĉar ni estas pretaj daŭrigi la strikon, krom se niaj gvidantoj diras al ni aliaĵon » konfidis al AFP ministo, Zenzo Mathale. « La kompanioj ne komprenas. Ili nur deziras fari profitojn. Tio povas daŭri ĉi-maniere, ni estas pretaj batali ! ».

Kolektiĝintaj en stadiono de Marikano, la ekspluatejo de Lonmin, la ministoj, je nombro de 80.000 strikantoj, akceptis per huoj la prezentadon de la dungantara oferto, farita de iliaj sindikataj delegitoj. Tiam, la homamaso kantis koruse la sloganon « Asiyi » : « Ni ne iros tien » (en la minejon).

**Kataro : Futbala Mondpokalo : preskaŭ 400 Nepalanoj mortintaj sur la konstruejoj**

En 2013, 185 Nepalanoj mortis sur la konstruejoj de la Futbala Mondpokalo kiu okazos en Kataro en 2022. Laŭ bilanco realigita de The Guardian, tio altigas la nombron de nepalanaj laboristoj kiuj mortis sur la infrastrukturaj konstruaĵoj al 382 en du jaroj.

La ĵurnalistoj de la brita ĵurnalo sin apogas sur « oficialaj » dokumentoj kiujn li ekkonis. « Tiuj informoj plifortigas premon kontraŭ FIFA (Internacia Federacio de Futbalo) kiu devas postuli rapidajn ŝanĝojn », skribas la ĵurnalistoj.

Laŭ The Guardian, la nombro de mortintaj laboristoj sur la konstruejoj estas eble multe pli grava ĉar Nepalo estas « nur unu el la multaj landoj » liveranta laboristojn al Kataro, kiu dungas entute 2 milionojn da migrantaj laboristoj.

La brita ĵurnalo, informita de la servoj de la nepala ambasadejo en Doho, jam denuncis la laborkondiĉojn de la migrantaj laboristoj en Kataro. En septembro, la ĵurnalistoj de

The Guardian malkaŝis ke 44 nepalaj laboristoj mortis sur la konstruejoj inter la 4a de junio kaj la 8a de aŭgusto. « Almenaŭ 36 laboristoj mortis en la semajno kiu sekvis niajn malakŝojn », eksplikas la ĵurnalistoj. Ia maniero por denunci la katarajn aŭtoritatojn.

**TIKLEGA AFERO POR FIFA**
La NRO Internacia Amnestio priskribis en raporto publikigita en novembro la laborkondiĉojn de la laboristoj sur konstruejoj, submetitaj al dekduhora labortago en la premega varmo de somero.

ITUC, internacia sindikato, konjektis tiam ke pli ol 4.000 laboristoj mortos en Kataro antaŭ la komenco de la konkuro en 2022.

Invitita reagi al la malkaŝoj de The Guardian, FIFA sin deklaris en septembro « tre zorgoplena pro la raportoj en la amaskomunikiloj kiuj rilatas laborjuran eksceson kaj laborkondiĉojn en la konstruado de projektoj en Lusail City, en Kataro ». « FIFA denove kontaktos la aŭtoritatojn de Kataro kaj la demando estos ankaŭ diskutata dum la kunveno de la ekzekutiva komitato la 3an kaj 4an de oktobro 2013 en Zuriko », aldonis la porparolanto.

La prezidanto de FIFA, Joseph Blatter, eĉ parolis pri « eraro » en la elekto de Kataro. La lando-organizanto de la Futbala Mondpokalo 2022 plie fariĝas pli kaj pli zorgoplena afero por FIFA, kiu frontas akuzojn de koruptado en la voĉdono pri elekto de lando-gastiganto kies klimato ŝajnas malmulte taŭga por somera sportokonkuro.



**Till Jirinas minne**

**Jirina Jonasson** som var en trogen medlem av SLEA och den svenska esperantorörelsen är död. Jirina var född 1922 och kom 1961 från Tjeckoslovakien till Stockholm, där hon gifte sig med Wilmer Jonasson, medlem i SLEA och SAT. Esperanto var deras gemensamma språk, som också fört dem tillsammans. Även sedan Wilmer avlidit i början av 2000-talet, förblev Jirina medlem i SLEA och även i Stockholms Esperantoklubb.

Jirina fick aldrig några barn tillsammans med Wilmer, men de hade goda kontakter med Jirinas och med Wilmers syskonbarn och med deras barn. Vid Jirinas begravning den 8 januari 2014 på Skogskyrkogården, fick Pelle och jag tillfälle att träffa många av släktingarna både från Tjeckien och Sverige. Vi förstod att Jirina för dem var en kär moster och faster som de alla skulle minnas med saknad.

Till Jirinas minne säger vi

**VILA I FRID! RIPOZU EN PACO!**

Text av Soile Lingman



# Norda Prismo




Ĉu vin interesas la konata revuo NORDA PRISMO ?

Ni havas grandan stokon da malnovaj numeroj.
Se vi deziras vi povas ricevi ĝin pagante nur la sendokostojn.

**NORDA PRISMO** (Kultura, socia, literatura revuo)

1957 # 2,4,5
1958 # 1,2,3
1959 # 1,2,3,4,5
1960 # 1-2,3,4,5-6
1961 # 1,2,3,4,5-6
1962 # 1,4
1963 # 1,2,4,5-6
1964 # 1,2,3,4

Sendu mesaĝon al: slea.smolando@hotmail.com

Eŭropa Kontraŭfaŝisma Manifesto

Sesdek ok jarojn post la fino de la Dua Mondmilito kaj la malvenko de faŝismo kaj naziismo, ni ĉeestas preskaŭ ĉie en Eŭropo la supreniron de la ekstrema dekstro. Sed, kaj tio estas eĉ pli timiga fenomeno, ni konstatas la aperon kaj kreskadon, je la dekstro de tiu ĉi ekstrema dekstro, de klare nov-naziaj fortoj kiuj, en iuj kazoj (Grekio, Hungario, …) enradikiĝas en la socio konstruante vere amaspopolajn movadojn, radikalajn, rasismajn, ultra-perfortajn kaj pogromemajn. Ilia deklarita celo estas detrui ĉiujn sindikatajn, politikajn kaj kulturajn organizojn de la laborista klaso, disbati ajnan civitanan reziston, nei la rajton je malsameco kaj ekstermi, eĉ fizike, tiujn kiuj estas "malsamaj" kaj tiujn plej vundeblajn.

Same kiel en la 20-aj kaj 30-aj jaroj, la fina kaŭzo de tiu ekstremdekstra kaj nov-faŝisma minaco estas la profunda ekonomia, socia, politika kaj eĉ morala kaj ekologia krizo de l' kapitalismo kiu, pretekste de l' ŝuldokrizo, kondukas al senprecedenca atako kontraŭ la vivnivelo, la liberecoj kaj rajtoj de la laboristoj, de ĉiuj troviĝantaj malsupre de l' socio!

Ekspluatante la timojn de l' povuloj je la riskoj de socia eksplodo, la radikaliĝon de mezklasuloj minacataj de la krizo kaj la drakonaj rimedoj de alĝustigo, kaj ankaŭ la malesperon de marĝenitaj kaj malriĉiĝintaj senlaboruloj, la ekstremdekstraj kaj precipe novnaziaj kaj novfaŝismaj fortoj kreskas ĉie en Eŭropo. Ili gajnas amasinfluon en la plej malriĉaj tavoloj de la socio, kaj direktas tiun influon sisteme tiel kontraŭ tradiciaj kaj novaj propekaj kaproj (enmigrintoj, islamanoj, judoj, gejoj, handikapuloj,…) kiel kontraŭ la sociaj movadoj, la maldekstremaj organizaĵoj kaj la laboristaj sindikatoj.

Veras ke la influo kaj radikalismo de tiu ĉi ekstrema dekstro ne estas la sama en la tuta Eŭropo. Tamen, la ĝenerala aplikado de severaj politikoj de alĝustiĝo kaŭzas ke la leviĝo de la ekstrema dekstro fariĝas preskaŭ ĝenerala fenomeno. La konkludo klaras: la fakto ke la spontana supreniro de la ekstrema dekstro kaj la apero de la amasa ultra-perforta novfaŝismo ne plu estas escepto al la eŭropa regulo, nun pelas la antifaŝistojn de tiu ĉi kontinento alfronti ĉi tiun problemon en ĝia reala dimensio, tio estas, kiel tuteŭropa problemo!

Tamen, aserti tion ĉi ne sufiĉas, se ni ne aldonas ke la lukto kontraŭ ekstrema dekstro kaj nov-naziismo estas absolute urĝa. Fakte, la nov-faŝisma minaco en multaj eŭropaj landoj estas jam tiel rekta kaj tuja, ke ĝi igis la kontraŭfaŝisman lukton unuaranga prioritato, batalo pri vivo kaj morto, en kiu troviĝas en risko la maldekstraj kaj laboristaj organizaĵoj, la libereco kaj la demokratiaj rajtoj, la valoroj de solidareco kaj toleremo kaj la rajto je malsameco. Aserti ke ni estas engaĝitaj en vetkurado kontraŭ rasisma kaj novfaŝisma barbareco korespondas al realo konfirmita ĉiutage en la stratoj de niaj eŭropaj urboj…



Konsiderante la profundon de la krizo kaj la grandecon de l' sociaj damaĝoj kiujn ĝi produktas, la intensecon de politika dispolusado, la decidemon kaj agresemon de la regantaj klasoj, la historian gravecon de la defioj en la nuna konflikto kaj la amplekson de la supreniĝo de la ekstrema dekstro, estas memevidente ke la kontraŭfaŝisma lukto fariĝas strategia elekto postulanta organizan planon kaj longperspektivajn politikajn kaj aktivulajn investojn. Sekve, la kontraŭfaŝisma lukto devas esti strikte ligita al ĉiutaga batalo kontraŭ la alĝustigaj rimedoj kaj la sistemo ilin generanta.

Por esti efikaj kaj plenumi la esperojn de la loĝantaro, la kontraŭfaŝisma lukto devas organiziĝi en maniero unuiga kaj demokratia kaj esti kreita de la popolaj amasoj mem. Tiucele, la civitanoj devas mem organizi sian kontraŭfaŝisman lukton kaj sian memdefendon. Samtempe, kaj por esti efika, tiu batalo devas esti tutmonda, alfrontante la ekstreman dekstron kaj la novfaŝismon ĉie, kie manifestiĝas la veneno de rasismo kaj ksenofobio, ŝovinismo kaj militarismo, de la kulto de blinda perforto kaj la neado de gaskameraoj kaj eĉ de Aŭŝvico mem. Mallonge, por esti efika longperspektive, la kontraŭfaŝisma lukto devas proponi en sia agado alternativan vizion de la socio, diametre kontraŭan al tiu proponita de la ekstrema dekstro. Tio estas, socio fondita sur solidareco, toleremo kaj frateco, malakcepto de masklismo, malakcepto de virina subpremado kaj respekto al la rajto je malsameco, internaciismo kaj skrupula protekto de la naturo, defendo de demokratiaj kaj humanismaj valoroj.

Ĉi tiu eŭropa kontraŭfaŝisma movado devas esti la heredanto de la grandaj kontraŭfaŝismaj tradicioj de nia kontinento! Tiucele ĝi devas provizi la bazojn de socia movado kun stabilaj strukturoj kaj ĉiutagaj aktivadoj, penetrante la tutan socion, organizante la kontraŭfaŝismajn civitanojn en retoj laŭ ilia profesio, loĝloko kaj inklino, efektivigante la lukton en ĉiuj kampoj de l' homa agado kaj plene alprenante la taskon protekti, eĉ fizike, la plej vundeblajn kuncivitanojn, la enmigrintojn, la ciganojn, la naciajn kaj etnajn minoritatojn, la islamanojn, la judojn aŭ la gejojn, ĉiujn, kiuj fariĝas la sistemaj viktimoj de la ŝtata rasismo kaj la faŝisma banditaro.

Tial ke la bezono por kontraŭfaŝisma mobilizado sur eŭropa skalo fariĝas tagon post tago pli prema, la subskribantoj de tiu ĉi manifesto, alvokas por la starigo de amasa, unuigita kaj demokratia Eŭropa Kontraŭfaŝisma Movado, kapabla alfronti kaj venki la brunan peston kiu denove levas sian kapon sur nia kontinento. Ni faros ĉion eblan por ke la fonda kongreso de ĉi tiu Eŭropa Kontraŭfaŝisma Movado, kies bezonon ni tiel forte sentas, okazu en Ateno en la printempo de 2013 kombinite kun granda eŭropa kontraŭfaŝisma manifestacio en la stratoj de la greka ĉefurbo.

Ĉi-foje, historio devas ne ripetiĝi!

ILI NE PASOS!

Teksto el la retejo:
http://antifascismeuropa.org/manifiesto/esperanto-eo

En Grekio okazas teruraĵoj, sed ne temas pri nur greka problemo. La unua kaj plej grava el ili estas la ekonomi-politika krimo kontraŭ la greka loĝantaro plenumita kaj plu plenumata de elito formita el bankistoj, politikistoj kaj altrangaj ŝtatservistoj, nun gvidanta la destinon de Eŭropo kontraŭ la popolo, kontraŭ kolektiva digno, kaj for de socia justeco kaj daŭripovo. Alia terurаĵo kiu nun okazas estas la leviĝo de malkaŝe nazia partio, Ora Tagiĝo, kiu ekestabliĝas en socio, en maniero nepensebla nur antaŭ kelkaj jaroj.

Se tiu fenomeno – kiu ne estas problemo specife greka, sed eŭropa – ne ricevas klaran respondon en ĉiu lando kaj je kontinenta nivelo, aparte de la malgrandaj jam organizitaj kontraŭfaŝistaj grupoj, la politika drivado suferata de niaj landoj fariĝos ekstreme sombra. Ne temas pri malnovaj fantomoj de la pasinteco, de jam superitaj aferoj, temas pri novaj realaĵoj kiuj modlas la estontecon de la popoloj de Eŭropo.

Dum longa tempo la greka ĵurnalisto Jorgos Mitralias, kune kun aliaj kontraŭfaŝistoj, faris paŝojn por halti la reaperon de la nov-faŝisma ekstremdekstro, kaj en Grekio kaj ankaŭ en aliaj partoj de Eŭropo. Sekvo de tiu reago estas la Eŭropa Kontraŭfaŝisma Manifesto, lastatempe apogita de la soci-politika movado Siryza, en februaro de 2013.

Ni kuraĝigas ĉiujn personojn ĝin subskribantajn, aktive ĝin subteni kaj disvastigi. Ni instigas ĉiujn gecivitanojn sin organizi por alfronti ĉi tiun socian malsanon kiu renaskiĝas kiel falsa respondo en krizaj tempoj.

Ni ne povas rigardi en alian direkton. Nun pli ol iam, ni devas defendi kaj favori alian Eŭropon: liberigan, kreivan kaj vere demokratian por ni ĉiuj, kiuj tie vivas.

Ĉi-foje la historio ne devas ripetiĝi!

Iniciatinta Komitato de la Eŭropa Kontraŭfaŝisma Manifesto

Teksto el la retejo:
http://antifascismeuropa.org/nos/esperanto-eo






Ekster mia fenestro
mi havas Jupitero kaj Venuso

Ili distance min observas
pro manko de homa saĝo

sed tamen ili scias

Mi ne estas kiel ili
Mi estas mortonta
kaj tiel eta
kiel sablero
tute nenecesa

Ni virinoj
kiel sangaj vundoj
Nekapablaj resaniĝu
ekviriĝi

Vi kvinnor
som blodiga sår
Oförmögna att läkas
till att bli män

**MI AMIS**

Mi amis
diverslingve
Uzis ĉiujn erojn
kiujn mi disponis
Mi amis
ĉiulingve

Mi diris
sensencaĵon kaj plensciaĵon
al tiuj, kiuj
tamen ne komprenas
Mi diris
vortlude kaj vortrime

Mi dancis
nedece kaj kviete
kun nuko klinita
kaj haro aranĝita
Mi dancis
tabuajn dancojn

Mi legis
diverslingve
Gustumis nuancojn
literumis vere
sonigis kaj ridis
sed mi legis

Ĉiam mi rigardis
per okuloj malfermitaj
Ne vualigis mian rigardon
per malhelaj okulvitroj
La lumo malbonigis mian lenson
sed la pejzaĝo estis tiel bela

Iam kiam mi ekdormos
je la lasta fojo
mi volas ke vi
fermos miajn okulojn
Vi kiu tenis la vizaĝon de amo
kaj karesis per teneraj manoj

**VIRINO**

Mi fieras esti
la evidenta dua sekso
Tiu kiu postsekvas la originalulon
La eterna kopio
persona non grata
tabula rasa
kiel aliaj priskribas
sen scii la lingvon

Mia rolo estas la ama
la patrineca mamo
la amema sino
al senpatrinorfoj
Tiuj kiuj forlasis
siajn originajn sonĝojn

Tamen neniam la virino estas
tiu kiu mizerigas la teron
sed tiu kiu donas vivon

**KVINNA**

Jag är stolt att vara
det uppenbara andra könet
Det som kommer efter originalet
Den eviga kopian
persona non grata
tabula rasa
som andra skriver
utan att kunna språket

Min roll är kärlekens
Det moderliga bröstet
Den ömma famnen
för de moderlösa
De som rest ifrån
sina ursprungliga drömmar

Men aldrig är kvinnan
den som utarmar jorden
utan den som ger liv

Poemoj de Lisbeth Johansson. Tradukita al Esperanto de Inga Johanson

---




**Enprizonita**

Se krimulo estas viro
enprizonita dum kelkaj jaroj
ĉiam okazas - al nia miro –
ke venas leteroj de virinaroj.

Eble la danĝero logas ŝin
esti rilata al tia viro
aŭ ŝi volas savi lin
per kristana diro.

Se krimulo estas virin’
neniam okazas la sama,
ŝi neniam ŝajnas diin’ ,
nur virin’ fifama.

Kial oni maljuste juĝas,
la du pro la sama krim’ ,
tradicie la penso fuĝas
kaj restas je malnova lim’.



## En la griza trembrilo de suburbo anĝeloj ne flugas

La turdombarakegoj stakitaj kiel domenaj blokoj,
tie oni trovas la forgesitajn individuojn de la komunumo,

konsistas el malgajaj kontinue-fumantaj patrinoj,
konsistas el elĉerpitaj, alkoholulaj patroj,

konsistas el forpuŝitaj, drogdependaj filoj.
Denove la suburbo perdas siajn anĝelojn,

denove la filosofia tribo korsuferas siajn sanktulojn,
morto trompe kaptas.

Ekster la komunumaj hantaj turdombarakoj la ekzistado estas kvieta,
aero estas sufoka,
ekzistado paliĝas malbele.

Mevoj kriaĉas suferade pri justeco
sed la situacio ne sin grandigas
kontraŭe ĉiu vivo restos enfermita en la sentempa atmosfero de suburbo.

Ekster la senkudra kaj senvidebla muro de suburbo videblas buntaj kontrastoj,
lumo en ĉiuj koloroj de la ĉielarko,
blindigitaj de urbanoj vivantaj ekster la mizero,
plene okupitaj je permesi al si  el la viva harmonio,
nekonsciaj kaj blindaj de la senlumo, kiu nevideble ĉirkaŭigas ilin.

Sed certe bonas trinketi iom da suburba sambukteo?
infuzita de larmoj de la patrinoj kies anĝeloj mortis.
Certe estas mirinde permesi al si iom da betona kremo?
kirligita de la animoj en la prijuĝitaj kaj senŝancaj suburbaj infanoj, anĝeloj sen flugiloj.

Kaj certe estas bone memori la suburban reviviĝon?
historio de sciado same malpura kaj frida kiel stratkanaleto ĉe trotoara eĝo.


**de Adam Hillawi**

Tradukita al Esperanto
de Inga Johansson



# Novaĵoj de libroservo

**Libroj**




Prezo: 150 kr





Prezo: 180 kr

**Broŝuroj**





Prezo: 30 kr





Prezo: 30 kr


**Lernolibroj**




Prezo: 90 kr





Prezo: 150 kr




Prezo: 150 kr

**DVD-filmo**




Prezo: 160 kr

**Por pli da informo vizitu www.slea.se**
**Sendu viajn mendojn al: slea.smolando@hotmail.com**

# T-ĉemizoj

## El ĉiu laŭ kapablo al ĉiu laŭ bezono



**Koloroj:** Blanka kaj flava

**Grandecoj:** S, M, L, XL

**Prezo:** 100 kr





## Esperanto DVD-filmo




Kun sia historio, sia spirito, sia klopodo, sia ideologio, Zamenhofo estas persono ne ordinara. Laŭ filmarta vidpunkto, temas pri « heroo », kiu vekas intereson kaj simpation. La filmstrukturo konstruiĝas sur bazo de la historio de Esperanto kaj ties elpensinto. Ĉiuj gravaj eroj de la historio resendas al antaŭa situacio.

Pritrakti la historion de Esperanto laŭlonge de la filmo donas plurajn avantaĝojn : malkovrigi la historion sen enui per tro longa sekvenco, ligi tiun historion kun la nuno, la klopodon de Zamenhofo kun la hodiaŭa aktivismo, malpeze elvoki la organizadon de la movado kun ties strukturo, montri kiel la utopio de Zamenhofo retroviĝas en la realo, lin paroligi per citaĵoj, eksterbilde luditaj far aktoro, reliefigi la indecon kaj la adaptiĝon de Esperanto al la moderna mondo, formale ludi per etosaj kaj ritmaj ŝanĝiĝoj.

La elekto de la ĉefaj temoj traktitaj en tiu dokumentfilmo ebligos atesti pri la hodiaŭa vivo de Esperanto : la internacia komunikado, la origino de Esperanto, ties kreado kaj la celoj de L. Zamenhofo, la lingva strukturo, la lernado, la ideologio, la Kongresoj intaj kaj nunaj, la movada organizado, la kultura produktado, la evoluado de la lingvo kaj ties diversaj uzoj (kunvenoj kaj kolokvoj internaciaj, vojaĝoj, gepatra lingvo...), ties agnosko far internaciaj instancoj kaj far intelektuloj, la estonto de Esperanto (la esperoj kaj la komencitaj agoj).

La universalan dimension alportos la sekvencoj filmitaj en diversaj landoj (Francio, Pollando, Germanio, Aŭstrio, Svislando, Hungario, Rumanio, Kubo) kaj uzo de multnombraj atestoj de diversnaciaj esperantistoj.

La materioj uzataj por ĉi filmo kutimas por dokumentfilmo : filmitaj kunparoladoj, ĝeneralaj ilustradoj, apartaj situacioj, eksterbilda komento, aŭtoraj citaĵoj per aktora voĉo, arkivaj fotoj, filmoj malnovaj aŭ freŝdataj, video-produktoj, gravuraĵoj, son-arkivoj, sed ankaŭ grafikaĵoj kaj animacio, por pritrakti kelkajn sekvencojn, kiel ekzemple la lingva strukturo.

La muzika ilustrado ĉerpiĝas el la riĉeco de la produktado kaj eldonado esperantistaj.

Por kongrui kun sia celo, la filmo baziĝas sur travivitaj situacioj, emoci- kaj signifoplenaj, kaj atestantaj je humanista spirito. La filmitaj kunparoladoj proponas individuajn klopodojn kaj spertojn, komplemetojn, klarigojn aŭ analizojn pri iuj historiaj aŭ nunaj faktoj, kaj la eldiroj de iuj « fakuloj ».

Pliaj informoj pri la filmo ĉe la oficiala retejo :

http://esperantofilmo.com/

# Libroservo de SLEA




## Libroj

| | |
|---|---|
| 7000 tagoj en Siberio. Karlo Ŝtajner | 80:- |
| Ĉu sekso subfosas? Paŭlo Popo. | 75:- |
| Doktor Zamenhof och det internationella språket. L. Nordenstorm & C. Lörnemark. | 50:- |
| Esperanto...över 50 miljoner träffar. Lars Forsman | 150:- |
| Kompendio de la kapitalo de Karlo Markso. Carlo Cafiero | 100:- |
| La danĝera lingvo – Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Ulrich Lins | 120:- |
| La Homo kiu defiis Babelon. René Centassi kaj Henri Masson. | 120:- |
| La Itala socialismo kaj Esperanto. Gramski. | 50:- |
| La liberecana socio. Georg Bastien | 10:- |
| La Pariza komunumo de 1871. | 50:- |
| La Ŝtona urbo. Anna Löwenstein. | 200:- |
| Historio de SAT 1921-1952. | 20:- |
| Mortopuno - faktoj kaj dokumentoj. | 80:- |
| SLEA kantaro. | 5:- |
| Sonĝoj de kristalo. Arko 2064. Jerom Leroy. | 50:- |
| Sveda Laborista Movado. Tage Lindblom (1947) | 10:- |
| Tertrema katastrofo de Japanio. Jasuo Hori. | 140:- |
| Vivbruligita (honorkrimo). Suad | 90:- |
| Vualo de l' silento. Ĝura | 80:- |

## Lernolibroj

| | |
|---|---|
| EPoGo Esperanto por gimnazianoj Textbok. C. Lörnemark, L. Forsman, K. Randehed, F. Wedlin | 150:- |
| EPoGo Esperanto por gimnazianoj Övningsbok. C. Lörnemark, L. Forsman, K. Randehed, F. Wedlin | 150:- |
| Esperanto direkt. Stano Marĉek | 90:- |

## Filmo

| | |
|---|---|
| Esperanto DVD. Dominiko Gaŭtiero | 160:- |

**Por pli da informo vizitu www.slea.se**

# ĈU VI VOLAS MENDI?

**KONTAKTO**

**Retpoŝto:** slea.smolando@hotmail.com

**Afrankoj aldoniĝas je sendo de libroj/broŝuroj.**

**Plusgiro:** 53160-8
(Sv.Arbet.Esperanto.förb.)